Pour tous renseignements s'adresser à la MJC Desforges, 27, rue de la République, à Nancy (Tél. 83.27.95.55).

L'EST REPUBLICAIN

► UN FESTIVAL A NE PAS MANQUER! ◀

Pour la 7ème fois, **ESPERANTO-FRANCE** organise cette prestation internationale originale - à laquelle tous nos lecteurs sont cordialement invités - qui a inscrit cette année à son programme:

► 9-10-11 novembre 1991 ◀

FESTIVAL INTERNATIONAL



DU THÉÂTRE ET DE LA CHANSON EN ESPERANTO

PARIS

- = du théâtre bien sûr, avec la troupe allemande "Kia Koincido": "La Pupdomo" (la Maison de Poupée, de Ibsen).
- = un récital de Ĵak le Puil.
- = un pot-pourri d'instruments de musique anciens.
- = un concert de musique rock.
- = un forum-débat: "Kien la Poezio?" (où va la poésie?).
- =... et des prestations d'artistes de divers pays.

Une nouveauté: Les artistes **espérantistes** exposent! (entre autre: des "collages" de G. Hoffmann, du Luxembourg).

Le lundi 11 novembre: Visite guidée de PARIS Histoire de l'espéranto dans la capitale.

Possibilité de réserver des chambres d'hôtel à prix modérés.

INFORMATIONS et ADHESIONS:

Daniel DOYE, 169, Avenue de Choisy, F-75013 PARIS
 à Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, L-5682 DALHEIM

7ème FETE DE L'HOMME, LA NATURE et L'ENVIRONNEMENT ☆


Les 14 et 15 septembre 1991, la ville de THAON-les-VOSGES vous accueille à sa célèbre "Foire régionale du Pain, Vin et Fromage éco-biologiques".

130 exposants dans la "Grande Rotonde" classée monument historique.

25 débats, causeries, projections, films avec présence de l'ESPERANTO.

INFORMATIONS: Jean-Paul COLNOT, 15, Rue de Lavaux, F-54520 LAXOU

(Proposez-vous pour aider à la gérance de "notre" stand durant le week-end)




TUTMONDA AERFESTO

Philippe Buron-Pilâtre
Président de La Fondation Pilâtre-de-Rozier
vous invite à

“LORRAINE 91”

la Biennale Mondiale de l'Aérostation
qui rassemblera 1000 montgolfières du 26 juillet au 4 août 1991
sur le nouvel Aéroport Metz-Nancy-Lorraine.



TO...☆...PRESENCE DE L'ESPERANTO...☆...PRESENCE DE L'ESPERANTO...☆...PRES

En Loreno, koro de la "Verda Eŭropo", naskiĝis la aerveturado. Pilâtre de Rozier estas la unua homo, kiu flugis en la aero. Tiel Loreno (Orienta Francio) fariĝas la tutmonda centro de aerveturado.

Por festi la inaŭguron de la nova flughaveno "METZ-NANCY-LORRAINE", okazos de la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto tutmonda festo, al kiu vi estas kore invitataj. Frumatene kaj fine de la posttagmezo ekflugos la aerostatoj. Dum la tago seninterrompa animado distros vin: koncertoj, spektakloj, ekspozicioj, foirfesto, karuseloj, piroteknikaĵoj, ne parolante pri ĝiuspecaj aersportoj: paraŝutismo, klifparaŝuto, senmotora flugilo, ktp.

Tiu manifestacio celas ankaŭ konigi la regionon al diverslandaj entreprenoj, kiuj havos okazon renkontiĝi aŭ inviti gastojn.

Kial Esperanto? La organizantoj atendas 1000 aerostatojn el 30 landoj... kaj 500 000 vizitantojn! Car temas pri internacia aranĝo, ili mem pensis uzi Esperanton kiel helplingvon. **ESPERANTO-FRANCE** havos budon, partoprenos la filatelian ekspozicion, aŭdigos kanzonojn. Reciproke la organizantoj esperas, ke ni venigos eksterlandajn vizitantojn kaj entreprenojn, kaj diskonigos la informon.

Venu multnombre ĝui la spektaklon de multkoloraj balonoj en la ĉielo! Malkovru gastaman regionon. Se vi parolas france kaj germane aŭ angle aŭ..., proponu viajn servojn!

Kunordigas la tuton J.-P. COLNOT, 15, Rue de Lavaux, F-54520 LAXOU. tel.: 83 27 95 55.

C'est en Lorraine, coeur de "l'Europe Verte", qu'est née la locomotion aérienne. Pilâtre de Rozier fut le premier homme qui se déplaça dans les airs (1783). C'est ainsi que la Lorraine est devenue le centre mondial de l'aviation.

Pour fêter l'inauguration du nouvel aéroport "METZ-NANCY-LORRAINE", des festivités mondiales auxquelles vous êtes cordialement invité(e) sont organisées du 26 juillet au 4 août. Tôt le matin et en fin d'après-midi ce sera l'envol des montgolfières. Au cours de la journée, animation ininterrompue pour vous distraire: concerts, spectacles, kermesse, feux d'artifice, sans oublier les multiples sports aériens: parachutisme, parapente, U.L.M., etc.

Cette manifestation ambitieuse également de faire connaître la région à des entreprises étrangères qui trouveront là occasion de se rencontrer ou d'accueillir des invités.



Pourquoi la présence de l'Espéranto? Les organisateurs attendent 1000 montgolfières en provenance de 30 pays... et 500 000 visiteurs!

Puisqu'il s'agit d'une manifestation internationale ils ont pensé avoir recours à l'Espéranto comme langue de secours. **ESPERANTO-FRANCE** aura son stand, participera à l'exposition philatélique, diffusera des chansons. Réciproquement les organisateurs espèrent que nous ferons venir des visiteurs étrangers, des entreprises, que nous diffuserons l'information.

Venez nombreux apprécier le spectacle de ces aérostats de toutes couleurs s'élevant vers le ciel! Venez découvrir une région accueillante. Si vous parlez français et allemand ou anglais, ou... proposez vos services!

J.-P. COLNOT, 15, Rue de Lavaux, F-54520 LAXOU (tél.: 83 27 95 55) est chargé de la coordination.

por U.F.E. _____
Renée TRIOLLE



Faites connaître nos "Mini-stages d'Espéranto"

Pour les personnes qui ne peuvent apprendre l'espéranto dans un cours du soir et ne souhaitent pas apprendre par correspondance, un mini-stage **mensuel** est proposé par la MJC Philippe Desforge, 27 Rue de la République, 54000 NANCY. Ces stages se dérouleraient d'octobre 1991 à juin 1992, un samedi par mois (en principe le 2ème), de 10h à 17h. La cotisation demandée ne dépasserait pas **200F pour l'année**. Possibilité de restauration et hôtel à prix modéré dans le voisinage. Un stage similaire cette année réunit des participants de 2ème degré, venus de toute la région de l'Est, du Luxembourg aux Vosges.

Le stage prévu pour 1991/92 comporterait un seul cours, **uniquement pour débutants**. Il ne fonctionnera que si 12 personnes au minimum s'inscrivent.

Renseignements par lettre à la MJC ou par téléphone auprès du responsable: 83 27 95 55

notre service de librairie



La Fédération met à la disposition de ses membres un important service de librairie spécialisé, à même d'offrir un choix de plusieurs centaines d'ouvrages relatifs à l'Espéranto, englobant à la fois le matériel d'étude, les oeuvres de la littérature mondiale espérantiste (originaux et traductions) -prose, poésie, théâtre...-, mais aussi disques, cassettes, documents divers, etc.

JUS APERIS...

Nia Fundamento sub lupeo (Mag. G.F.Makkink) = Juan Régulo Perez pri la verko skribis "La libro de M.M. estas mejloŝtona verko de nia propra lingvokulturo. Mia impresoj pri ĝi estas pli ol tre bona... Mi simple estas ravita!"

= 65 FF

La septaga murdenigmo (Roland C. Gates) = 80-paĝa romaneto, facile legebla. Agrabla distraĵo en perfekta, ĉiutaga esperanto.

= 35 FF

Urd Hadda murdita! (Deck Dorval) = "...en la apuda ĉambro horloĝo sonigis unusolan obtuzan baton... kaj per tio la inercio estis rompita..."

Jen streĉa nova polic-romano de jam konata aŭtoro, kiu kaptos vian tutan atenton.

= 80 FF

Drolaj rakontoj (Honoré de BALZAC) - selekte tradukita de Fernando de Diego = Tiuj "Contes drôlatiques" inspiriĝis de la burleske-sensuala spirito de Rabelais kaj montriĝas ia-specca franca Dekamerono.

= cirkaŭ 30 DM

La buton-milito (Louis PERGAUD) = Temas pri la Esperanta traduko de *La guerre des boutons* en la tre trafa traduko de Roger BERNARD, membro de la Akademio de Esperanto.

Jen nepre havebla libro! Vi frandos la turbulentajn scenojn el la rivalaj infan-bandoj en franca Ĵuraso en la pasinta jarcento...

SERVICE DE LIBRAIRIE ESPERANTO

12, Rue Estienne d'Orves

F-54490 PIENNES



NIA VIVO EN...

VESPERAJ KURSOJ = La unuagrada, kiu komenciĝis dum oktobro, nun finiĝis. Ni daŭrigas la lernadon de "Metodo 12"; 12 gelernantoj pli malpli regule ĉeestas. Ni preparas la trapason de "Atesto pri Lernado". Ĉiam merkrede je la 19a (gis 20a30). Plurfoje plie marde samhore.

La triagrada kurso plu okazas ĉiun 4an semajnon, merkrede je la 17a30. Lasta fojo: la 12an de junio. Konversacia rondo pli malpli regule okazis je la 20a30 (ankoraŭ la 29an de majo kaj eble la 26an de junio).

La 13an de februaro, Philippe Chauvignon venis el Chateauroux por prezenti al ni sian agadon en Afriko, kie li instruis la "Metodon ĈE", por ke la Afrikanoj povu lerni sen studlibroj. Ni ankaŭ spektis lumbildojn pri Zairio.

POST LA EKSPOZICIOJ = Finfine la 5a prezentado de nia ekspozicio en "I.U.T. Médre-ville", de la 2a ĝis la 5a de aprilo, kiu okazis dank' al Catherine kaj Madeleine Roux, montriĝis unu el la plej fruktodonaj. Dekoj da studentoj interesiĝis. Mi provis starigi rapidan kurson 10-lecionan. Mi provis unue, merkrede je la 20a30: nur 1 persono venis. Mi rekontaktis personojn promesintajn veni, telefone aŭ letere, kaj plie promesis veni studentoj de IUT. La 2a provo okazis ĵaŭde je la 18a horo. Tri personoj venis; pro la proksimiĝantaj ferioj mi decidis ne funkciigi tiun kurson: 2 aliĝis perkoresponde, 1 promesis veni oktobre. Alia studento de IUT aliĝis poste per koresponde. Do, firma rezulto: 3 perkorespondaj gelernantoj.

PERKORESPONDA KURSO = Mi informis entute 105 personojn, sed sekve al la 21 komunikoj aperintaj en la gazetaro, venis nur iom pli ol 60 leteroj. La ceteraj sekvis ekspoziciojn, aŭ afisojn kaj flugfoliojn en Nancy. gis la 22a de majo aligis 21 gelernantojn. Gis nun, 2 el ili jam atingis la finon de "M^o11": Sin^o Martine **KOCHER** en MUTZIG (67190) kaj Sr^o Didier **BEUTLER** en BISCHWIHR (68320), ambaŭ gviditaj de Sin^o **BUSSER**. Gratulojn al ili!

MONATAJ STAĜETOJ = Ili plu okazis la 2an sabaton de ĉiu monato. La 8a okazos la 8an de junio; en ĝi okazos ĝenerale ekzameno de "Atesto pri Lernado" por ĉiuj staĝanoj kaj ĉiuj gelernantoj de la vespera kurso. Ĉiam de la 10a ĝis la 17a, kun tagmeza "kuskuso"... Kelkaj personoj provos trapasi la "Ateston pri Praktika Lernado".

DENOVE EN THAON-les-VOSGES = Kun Sr^o Simonnet, ni denove rezervis 2 standojn en la "FESTO de la Homo, Naturo kaj Ĉirkaŭaĵo" en **THAON**, la 14/15ajn de septembro (2 standoj 3,50 M-larĝaj estas necesaj por prezenti nian ekspozici-panelojn. Ni kalkulas kun via vizito (kaj helpo!).

J.-P. COLNOT

BAR-LE-DUC



La ĉefa evento en la klubo (kies membroj regule monate renkontiĝas) estas la akcepto de Ilona KOUTNY, kiu gastis du tagoj ĉe samideano Gilbert kaj prezentis la parolsintezilon "Speaktronics". Interesiĝas cetere la lingvo-fako de la departementa Komere- kak Industriĉambro.

Ses staĝanoj de Institut des Forces de Vente 55" sukcese trapasis la unuagradan E^o-ekzamenon kaj ricevos sian diplomon dum oficiala kunsido la 28an de junio.

Antaŭvidiĝas tria aŭtomobil-ralio en septembro, al kiu estas invitataj ĉiuj emuloj de la regiono (vidu apartan aliĝilon!). Du klubanoj partoprenis la kultursemajnfinojn en HOMBURG kaj ses (6!) la staĝon en ILLZACH... Gratulon!

Publika elementa kurso estas programita por la lern-jaro 91/92 (komenciĝo: 16/10)

*

PRI LA TUTMONDA AERFESTO "LORRENO 91"

Certe, tio estos, lige kun esperanto, unu el la plej gravaj eventoj en nia regiono por la nuna jaro. Vi povis legi en la aparta paĝo, kiun ni dediĉas al tiu evento, la ĉefajn informojn pri ĝi. Ekzistas prospekto, en la franca kaj verŝajne en kelkaj pliaj lingvoj (ĉefe la angla), pri "LORRAINE 91". Renée TRIOLLE tradukis ĝin en esperanton, kaj la esperanto-aldonaĵo estas nun presata. Vi povas helpi la aferon, mendante prospektojn: franclingvajn, por disdoni ĉirkaŭ vi al amikoj najbaroj, interesatoj... plus esperanto-aldonojn por dissendo (kune kun la ilustra prospekto) al viaj eksterlandaj korespondantoj. Francoj prefere mendu franclingve (indiku la deziratan nombron) al:

"LORRAINE 91" BP 18, 6 Place du Temple, F-57530 COURCELLES-CHAUSSEY

Tél.: 87 64 08 08

UFE dissendis komunikon pri tiu evento al la tuta Esperanto-gazetaro. Ĝis la mezo de majo enskribiĝis 500 flugbalonaj teamoj el 30 landoj, sed oni atendas 500 pliajn ĝis la fino de julio.

Ne eblas ĝis nun scii, ĉu efektive venos esperantistoj, ĉar la decido de la organiza komitato uzi E^on kiel helplingvon datumas de marto, kaj la dissendo de invitoj al tutmondaj aerostatistoj okazis multe pli frue, sen mencio de Esperanto.

Nia laboro estis, unue kunlabori, tradukante tekstojn en E^on, provante informi, venigi homojn el multaj landoj, se ne el la tuta mondo. Due ni disponos senpage pri tendo por tie prezenti standon pri Esperanto. Sed ĝi estos nur 4x3 metra. Tio signifas, ke ni malfacile povos prezenti nian tutan ekspozicion. Ŝajne estus intencoj prezenti, pere de televidilo kaj magnetoskopo la videobendon de UFE. Tio ankoraŭ reduktos la eblecon de prezentado de la ekspozicio. Do, ni devos elekti. Mi aldonu, ke oftaj trajnoj kaj aŭtobusoj inter METZ, NANCY kaj la flughaveno faciligos la veturadon el tiuj 2 urboj. La eniro al la aerodromo, la parkejoj estos senpagaj por ĉiuj.

Por disdono al la aerostatistoj, ni bezonus prospektojn en... 30 lingvoj por informi ilin pri Esperanto!... laŭ la organizantoj, ĉefe en la angla kaj en la franca. Mi petis la Sarlandan Ligon, ĉar ĝi povus liveri en la germana. Cetere por informi la 500 000 vizitantojn (kun espero ke ne ĉiuj vizitos nian standon... pensu, ke temas pri 50 000 personoj ĉiutage, ĉar la festo okazos de la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto inkluzive, do dum 10 tagoj) ni bezonas ankaŭ amason da flugfolioj. UFE promesis liveri "Unuajn Rendevuojn". Mi esperas sukcesi presigi kvanton de la kutimaj prospektoj regione uzataj. oni parolis ankaŭ pri flugbalonetoj por infanoj, kun reklamo pri E^o, kaj premioj al la dissendintoj, kies balonoj plej malproksimen flugos... Kiu financos? Ĉu nia Federacio, ĉu UFE? Kiom da deĵorantoj povos antaŭe prepari, poste labori sinsekve dum la 10 tagoj? Laŭ nia ĝisnuna scio, preskaŭ ĉiuj aktivaj esperantistoj, kiujn mi konas, estos for: ĉu en Bergen (por la U.K^o, samdate), ĉu aliloke. Ĝis nun mi disponus pri deko da lernantoj, kiuj plej bonvole pretos helpi kelkajn horojn aŭ 1 aŭ 2 tagojn. Tio ne sufiĉos. Renée Triolle skribis: "Necesos aktivaj informantoj, kiuj ĉion scias pri E^o, kapablas tuj trovi en la Jarlibro la ĝustan informon, povas adaptiĝi al la kunparolantoj por en tri vortoj alkroĉi ilin...". Belega programo, sed neniu el la ĝis nun konataj helpontoj similas al tiu portreto. Ankaŭ mi ne!

Tial, kara amik(in)o, se vi rekonis vin en tiu priskribo, ne hezitu skribi por proponi vin! Eĉ se vi estos pli modesta kaj deziras helpi, ankaŭ tiam anoncu vin!

Jen multaj problemoj ankoraŭ leviĝos... En ILLZACH ni nepre devos trovi solvojn.

J.P. COLNOT, 15 Rue de Lavaux, F-54520 LAXOU Tel.: 83 27 95 55



24h. sur 24

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



➔ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...

INTERNACIA ESPERANTO-FESTIVALO EN PARIZO

9/10/11ajn de novembro 1991

=====

...kun interalie:

- = Teatro - La trupo "Kia Koincido" el Germanio prezentos verkon de Ibsen, "La Pupudomo"
- = Recitalo - kantos Ĵak Le Puil (Francio)
- = Muziko per malnovaj tradiciaj instrumentoj
- = Koncerto de rokmuziko
- = Forumo: "kien la Poezio?"

kaj prezentoj de pluraj aliaj artistoj el diversaj landoj

Novaĵoj: Ekspozicio de esperantistaj artistoj (i.a. kungluaĵoj de Germaine HOFFMANN el Luksemburgio)

Lunde: gvidata vizito de Parizo - historio de Esperanto en la ĉefurbo

Eblos rezervigi hotelĉambron je modera prezo

Informoj kaj aliĝoj: Daniel DOYE, 169 Avenue de Choisy, F-75013 PARIS
aŭ Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, L-5682 DALHEIM



UNE DATE A RETENIR! ☆

Celle du 32ème STAGE PRATIQUE d'ESPERANTO PARLE organisé sous les auspices de notre Fédération...

C'est à nouveau le pittoresque bourg de **MERKWILLER** (F-67) qui nous invite à cette studieuse, enrichissante...-et amicale!- "fin de semaine" culturelle les samedi 19 et dimanche 20 octobre 1991.

Le programme (cours d'espéranto multi-niveaux, conférences-débats ...et détente) est en cours de préparation. Le bulletin d'inscription sera inséré dans le prochain n° de LA INFORMILO (à paraître fin septembre). On peut d'ores et déjà s'inscrire par anticipation auprès de l'organisatrice:

Odette SCHEIDEL
35, Grand' Rue
67660 F-BETSCHDORF



&

BAVELO

Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de DB
Vereinigung Deutscher Eisenbahner-
Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Baden-Virtemberga
Esperanto-Ligo
Esperanto-Verband
Baden-Württemberg e.V.

komune invitas al / laden gemeinsam ein zu

**Jarkunveno & kongreso
Friedrichshafen**

11. - 13. Oktober 1991

en/in: Fischergaststätten im Hafbahnhof, D-w- 7990 Friedrichshafen,
tel: 07541 - 21671

Aliĝoj, pagoj kaj ĉambromendoj / Anmeldungen, Zahlungen und Zimmerbestellungen an:
Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str. 12, D-w 7100 Heilbronn, tel. 07131/162688

☆
3ème AUTOMOBILA ESPERANTO-RALIO = Dimanche 22 septembre 1991 - 10h à 15h... ←

Organisé par le Club d'Espéranto de BAR-le-DUC, il vous fera découvrir au cours d'un périple d'environ 50 km, une région pittoresque des alentours. Tous les participants seront récompensés à l'issue d'un stimulant "jeu de piste" (questionnaire en espéranto... et en français pour vos parents et amis cordialement invités) qui permettra à chacun d'exercer sa perspicacité de diverses façons.

Comme à l'accoutumée, les "rali-em-uloj" se retrouveront pour un pique-nique mémorable près du charmant village de... (chut!).

Toutes précisions seront ultérieurement données à tous nos lecteurs qui feront parvenir le fichet d'inscription (avant le ...15 septembre!) à:

F.-X. GILBERT, Vert Coteau, F-55000 **LONGEVILLE-en-BARROIS**



BULLETIN D'INSCRIPTION AU
3ème RALLYE AUTOMOBILE ESPERANTISTE

NOM et PRENOM:


ADRESSE:

= participera au rallye proposé et recevra en temps utile toutes informations nécessaires.

= sera accompagné(e) de personnes.

Date:

Signature:



parolgenera sistema por komputiloj IBM PC

Dum la U.K^o en *Havano* oni aŭdis pri ĝi, kaj nur kelkaj persistuloj povis aŭskulti ĝin en la minutoj ŝtelitaj de la komputile redaktantoj de la kongresa kuriero, sed dum la Itala Kongreso en *Padovo* (fine de aŭgusto) **ESPAROL** signifis interesan varion al la movadaj diskutoj. La esperante kaj itale parolanta komputilo en la koridoro prononcis la plej malsamajn dezirojn de la interesiĝantoj per diversaj tonoj, rapidecoj kaj akcentoj. Poste okazis oficiala prezentiĝo ĉe la firmao "Logix" en *Romo*, kiu poste subskribis kontrakton enkomercigi la italan kaj esperantan parolsintezajn sistemojn en Italio.

Dum la Budapeŝta "**EXPOLINGUA**" (meze de septembro) iu gentile kaj senlace invitis la preterpasantojn, hungare kaj esperante, viziti la budon de Hungara Esperanto-Asocio, tiel distingante ĝin de la renomaj libroeldonejoj. Kiuj proksimiĝis, malkovris la fonton: **komputilon**, kiu samtempe prezentis kolorajn bildojn rilatajn al la evento. La kuraĝuloj eĉ povis komenci lerni esperanton per la komputilo, tio estis anoncita dum la rondtabla diskuto pri perkomputila instruado, al kiu D-in^o **KOUTNY** estis invitita.

La unua internacia konferenco dediĉita nur al **parolsintezo** okazis apud *Grenoble* (Francio), fine de septembro. Inter la rekonataj parolsintezaj sistemoj de la mondo aperis sukcese la hungara "**MULTIVOX**", kiu parolas jam hungare, germane, itale, finne... kaj esperante. D-r^o **Olaszy** estis invitita preleganta.

Jen la tria parto de la prelego de nia juna samideano Tsukuru, prelego bedaŭrinde interrompita dum pasinta kultur-semajnfino, kaj kiu tiam vekis grandan intereson ĉe la aŭskultantaro (vidu antaŭajn numerojn de "La Informilo").

= MIA VIVO DE JAPANA KNABO =

Por skribi ni ne uzas kiel vi **literojn**... Ni uzas **tri** sistemojn. Unu nomiĝas **ideogramoj** kaj kaj la du aliaj nomiĝas "**kana**": unu estas **katakana** kaj la alia **hiragana**. Tiuj du sistemoj prezentas **ne** simplajn sonojn, kiel viaj literoj, sed **kompleksajn sonojn**, tutajn silabojn! Ĉiu "**kanao**" havas do 70 signojn (pli malpli 40 simplajn kaj 30 kompleksajn, nomatajn "**nigori**"), kiuj prezentas po unu silabo. En la eŭropaj lingvoj, **ka**, **ke**, **ko**... estas silaboj, sed por skribi ilin, vi ĉiam uzas la literon **k** kaj vokalon. En la "**kanaoj**", **ka**, **ke**, **ko** estas sendependaj signoj, kiuj tute ne similas unu la alian. La du "**kanaoj**" prezentas la samajn sonojn, sed ni ne uzas la du sendistinge! Mi ne volas enuigi vin per longaj klarigoj, sufiĉas, ke vi sciu, ke, ekzemple, por fremdaj nomoj ni uzas **katakanaon**, kaj **hiraganaon** por japanaj vortoj... se ni ne uzas **ideogramojn**!

MULTIVOX estis prezentata en pluraj germanaj universitatoj (Paderborn, Heidelberg, Stuttgart, Saarbrücken) dum la prelegvojaĝo de D-rin^o **Ilona KOUTNY** (novembro 1990). Ŝi estis invitita ankaŭ por prelegi pri la evoluigata instruprogrampakaĵo "**Parolern**" dum la Internacia Konferenco pri Komputila Instruado en la Universitato de **AMSTERDAM** (1990/10/24-25). Estas ellaborata studmaterialo por instrui Esperanton kaj la hungaran lingvon per la multflanke uzablaj instruprogramoj.

Dum **EXPOLINGUA** en Vieno (januaro 1991), eĉ du E^o-budoj atendis la preterpasantojn, kaj per la konata "**maŝina voĉo**" invitis ilin. En aprilo D-in^o **KOUTNY** daŭre prelegprezentis la tutan novan instrusistemon en diversaj universitatoj kaj E^o-kluboj en Francio.

La plurlingva parolsintezsistemo **MULTIVOX** estis evoluigata en la Parolesplora Laboratorio de Budapeŝta Teknika Universitato, kunlabore kun la Fonetika Laboratorio de Hungara Scienca Akademio, simile al la antaŭa sistemo por "Commodore" komputiloj. La replanita kaj antaŭ nelonge finpretigita sistemo -memstara parolskatolo konektebla al printila interfacio kun disketo kun iu el la menciitaj lingvoj- funkcias kun **IBM PC** kaj kongruaj komputiloj. La esperanta varianto distingiĝas per propra nomo: "**ESPAROL**", kaj ligiĝas al D-r^o **Gabor OLASZY** (gvidanto de la Fonetika Laboratorio) kaj al D-in^o **Ilona KOUTNY** (Esperanto-Fako de Eötvös Universitato).

Sintezita parolo povas esti utiligata en:

- = aŭtomataj inform sistemoj (vojaĝinformoj, retrovo al datumbankoj, bankservoj).
- = industrio (alarma aŭ mesaĝoj, procezkontrolo).
- = scienco (ŝanĝeblaj parolparametroj por fonetikaj kaj psikologiaj eksperimentoj, esploro de aŭdkapablo).
- = eldonado (provlegado).
- = helpo al malavantaĝuloj (laŭtleĝo por blinduloj, parolilo por mutuloj).
- = edukado (instruado de fremdaj lingvoj, ekzercado de gepatralingva ortografio, helpo ĉe problemoj de legado kaj skribado).

Jam haveblas la parolanta teksto- kaj programredakta sistemo (speciale por blinduloj), ellaborita far **Rudolf MRENA**, esploristo de BTU. Pluraj instruprogramoj jam pretas. La tutan instruprogrampakaĵon **PAROLERN** kaj studmaterialon por **komenca esperanto-kurso** D-in^o **Koutny** promesas por aŭgusto. Parolanta vortaro kun la plej gravaj 1000 vortoj pretiĝas por pluraj lingvoj.

Pluaj informoj pri ĉio, ĉe D-in^o **Ilona KOUTNY**, Budapeŝta Teknika Universitato, BME-HEI, H 1111 BUDAPEST, Sztoczek u.2., aŭ **ESPERANTO-FAKO** de Eötvös Universitato, H-1364 BUDAPEST, Pf. 107.

Mendoj ĉe NIKOL Gmk (H-1111 BUDAPEST, Bercsényi u.9).

Nu, kio estas "ideogramoj"? Ili estas signoj, kiuj origine estis desegnaĵoj, kaj ili venas el la ĉina. Ekzemple por "ĉevalo"... oni desegnis ĉevalon, sed en la trakuro de la jarcentoj la desegnaĵoj fariĝis tute ne kompreneblaj kaj ni, nun, devas lerni inter mil tricent (1300) kaj trimil (3000) ideogramojn por montri normalajn ideojn! Por la gramatikaĵoj ni uzas la **hiraganaon**... Kiel vi vidas, tre simpla afero! Vi do povas imagi, ke se eŭropa infano bezonas unu jaron por akiri la leg-kapablon, la malfeliĉaj niponaj infanoj bezonas... jarojn! Pro tio ni komencas lerni frue, kaj en la elementa lernejo mi lernis kelkajn kanaojn kaj ideogramojn, ekzakte kiel eŭropa infano povas kompreni la sencon de desegnaĵo por **viro** aŭ **virino** sur pordo de necesejo!

(Ĉi-loke la redaktoro de "La Informilo" opinias, ke estus intresinde ŝovi "konkretan" parton... Jen kelkaj pluaj "klarigoj", kiujn liveris al li siatempe, lia japana korespondando)

"...Antaŭ ĉirkaŭ 2000 jaroj alvenis nian landon, **KANĴI** (ĉina litero). Jen kelkaj naj-vaj manieroj de "traduko"....:

か か ん じ 漢 字 KI litero	reala okulo 	ideografiaja litero 目
	reala ĉevalo 	ideografiaja litero 馬
	reala suno 	ideografiaja litero 日

	originala ĉina litero	tiel transiris skribmaniero (eĉ nun ekzistas multe!)	
fonetike signifas →	a kaj an	安 安 安 安 →	fonetika litero
facila	以	以 以 以 以 →	
fonetike signifas →	i		fonetika litero
kun			

平	parta	a	阿 阿 阿 阿 →	ア
假	provizora	i	伊	イ
名	fonetike	?		

Tiam, kiam oni ricevis ĉinan literon, oni tre malfacile povis esprimi sian ideon per ĝi, ĉar ĝi estis **ne fonetika** litero sed **ideografia**! Do, oni uzis ĝin kiel **fonetikan** literon, jene:

Esperanto	amas			
fonetike	aa ma su			
KANĴI (ĉinlitere)	安	以	厶	留
	a	i	su	ru
japane = fonetike nuntempe	ア	イ	ス	ル
	あ	い	す	る
	変	す	る	

La posta baldaŭa kreo de fonetika signo estis do natura kaj nepra decido. **hiragana**, kaj malfrue **katakana** estis faritaj.

Mi prenu ankoraŭ pli konkretan ekzemplon... mian propran nomon:

Joŝida Kusuho

吉	田	九	洲	穂	KANĴI
joŝi	da	ku	su	ho	fonetike
ヨシ	ダ	ク	ス	ホ	KATAKANA
よし	だ	く	す	ほ	HIRAGANA
bona kampo naŭ kontinento spiko					esperanto (signifo de Kanĵi)

Ni, Niponanoj, devas pensi kompliketegajn signifojn de litero tiam, kiam ni aŭskultis ĝin per sono, aŭ rigardis ĝin sub litera formo.

Se ni okulumis fonetikan literon tiel \times aŭ H , tio tuj proponas al ni ĉirkaŭ kvar (4!) aĵojn kaj ideojn...


1 ?

2 ?

3 ?

4 ?

Se ni telefone interparolus:



Tragedio, tio estas, ĉu ne?...

De tago al tago ni estas suferigataj de nia naskiĝo ĝis nia morto!"

Nu, mi aldonu: niaj literoj estas ĝenerale skribitaj de dekstre maldekstren... kaj de supre supren... Feliĉe, nuntempe oni uzas "vian" skribmanieron! La sama teksto povas sekve kuŝi en du malsimilaj libroj!



吉田九洲穂
Oni povas
legi
dumaniere...

Ĉiun jaron, estas en Nipono, konkursoj por scii, kiu plej bone skribas *kanas* kaj *ideogramas*. Mi bonŝancis kaj ricevis premion pro la beleco de mia skribo, ĉar en Nipono kiel en Ĉinio, kaligrafio estas tre ŝatata arto.

Mi tamen devas kun honto konfesi, ke mi ne konas ĉiujn ideogramojn... Estas tro da ili! Tre klera persono konas eble ĝis dek mil (10 000)! Mi ne scias, kiom da... mi scias! Sed okazas, ke en libro mi renkontas ideogramon, kiun mi ne konas. Ofte oni povas *diveni* la sencan sed ne ĉiam, kaj tiam oni devas serĉi en vortaro. Tio ne estas tre malfacila afero: oni unue devas kalkuli la nombron de la strekoj, per kiuj ĝi estas skribita, ĉar en vortaro la ideogramoj estas ordigitaj laŭ la nombro de tiuj strekoj! Sed kompreneble, tio ne estas tiel simpla kiel serĉi vorton en latinalfabete skribita vortaro!

Alia problemo estas, ke oni ne ĉiam scias, *kiel prononci* tiajn vortojn, ĉar ili foje havas ĉinan legmanieron kaj japanan!!! En la elementa lernejo, mi lernis skribi ankaŭ per bambua skribilo kaj uzi japanan abakon, kiu nomiĝas *soroban*.

Poste mi devis iri al mezgrada lernejo. Ankaŭ vian mezgradan lernejon vi ne rajtas elekti mem. Tion oni decidas por vi. En mia kvartalo estis tri, kiuj nomiĝis Hazukan, Sirikawa kaj Izumi. La plejmulto el la lernantoj iris al la Izumi-lernejo kaj ankaŭ mi iris al tiu. En mezgrada lernejo oni komencas lerni la anglan lingvon, sed mia sperto estas, ke oni lernas ĝin terure malbone, ĉar ankaŭ la instruistoj terure scias ĝin!!! En la unua klaso de tiu lernejo oni devas tute razi siajn harojn. En la dua klaso, ni povis porti pli longan hararon, sed ĝi tute ne devis kovri la orelojn. La knaboj portis ŝultrosakojn fiksitajn per ŝultrorimeno kaj sur la sakoj estis la emblemo de la lernejo.

Ni devis surhavi nigrajn pantalonon kaj jakon similan al jakoj de soldatoj aŭ, se vi preferas, al la ĉinaj *Mao-jakoj*. Sur la rigida kolumo estis la emblemo de la lernejo kaj indikoj pri la klasoj kaj klasĉambroj... eĉ ankaŭ sur la butonoj!!! Plie, sur la brustoposo, ni devis porti nomŝildon. Mi pensas, ke tiu militista sinteno estas restaĵo de la "*samurajaj*" tagoj. Somere, ni surhavis blankan ĉemison kun nigra pantalone, dum la knabinoj portis blankan ĉemison kaj bluan robon, sed vintre ili surhavis malhelan bluan robon.

La unuan jaron ni devis kunporti niajn manĝaĵojn kaj niajn bastonetojn, sed ekde la dua ni ricevis nian manĝon en la lernejo mem.

Kiam mi alvenis malfrue, mi estis punata: mi devis resti staranta en la koridoro apud la pordo de la klasĉambro dum duonhoro aŭ eĉ dum unu tuta horo, portante *du sitelojn plenajn je akvo!* Mi aŭdis, ke tio ankaŭ ekzistis en Eŭropo antaŭ multaj jaroj... Ĉu veras?

TSUKURU HARADA
(sekvota)



distra angelo



KRUCVORTENIGMO ☆

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 Ĝi favoras la lingvolernadon. 2 Herbo kaj arbusto (r) - pensanta parto de la spirito. 3 Organo produktanta la gametojn - seksindika - kastrita taŭro (r). 4 Moviĝu direkte al io! - ekzakta determino de punkto (r) - virseksulo de remaĉuloj (fonet.) - adverbo. 5 Blua ĝis herboverda gemo - havigi al si (r). 6 Ĉek- aŭ kvitanĉparto - surmonta paŝtejo - inproduktaĵo (r). 7 Kun-kolektilo de herbo - temanta pri amo. 8 Reedukado de la movoj (r) - entenas ĉiujn siajn partojn (r). 9 Etendita aŭ sternita substancaranĝo - mempropulsa kaj telekondukata pafaĵo. 10 Homo, kiu scias nek legi nek skribi - virkoro. 11 malpli granda ol normala alteco - teologojuristo -

greka litero. 12 Inflamo de ia medolo.

VERTIKALE

1 Membro de urba konsilantaro. 2 supermezura - frukto (r). 3 Virantaŭnomo - alia nomo de ĉiu dio (r). 4 Baza, magma rokspeco kiel bazalto (r) - potofragmento - arbeto kun kafeinfruktoj. 5 Mezurunuoj por angulo - sufikso - gasa, pli aŭ malpli densa produkto (r). 6 Elemento, atomonnumero 17 (r) - Patriarko - kapo de leono. 7 Meritanta amon - movi boaton (r) - grundo preparita por plantoj. 8 Reguliga horloĝorgano - parto de fulmofermilo - sufikso. 9 Rebaptas la plenkreskulojn. 10 Parto de plugilo (r) - sekskuniĝi - narkota substanco (r). 11 Difinita parto de spaco (r) - pronomo - oftalmologo (r). 12 Astronomia establo.

SILABENIGMO ☆

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ak al am aso bo ci di ei el el en en ero go go imi ke klo ko kso kso la li lo lo lo lo lu mi naŭ ni no no no of ol or pi re ro se so ta ta ten to to to tru vo

1 + - - + - -	ano de aviadila personaro
2 + - - + - - -	parto de aviadil-stirilaro
3 + - - + - -	senpersoniigita laboristo
4 + - - + - -	malrespekti iun
5 + - - + -	unuoj de lumiga intenso
6 + - - + - -	triglicerido de oleata acido
7 + - - + - - -	forigi, malaperigi
8 + - - + - -	tegmenta trabo
9 + - - + -	ilo de masonisto
10 + - - + - -	saluti per ĝojaj krioj
11 + - - + - - - - -	medicina fakulo
12 + - - + -	granda senorda kvanto
13 + - - + - - - -	koncerto de unu artisto
14 + - - + -	kripligita leĝo
15 + - - + - -	polica esploro
16 + - - + -	muzik-intervalo
17 + - - + - - - -	longa palpofadeno ĉe animalo
18 + - - +	terura cetaco



Lia Moŝto Prezidanto
John C. VELLIS
Prelegas
Kaj subite, malrespekte
blankegriza kolombino
perturbas
De trabo al trabo
ŝi flugetas
Lacigite, ekzakte
super lia kapo
sursolive
ŝi ripozas
Hej! Danĝeras!
Nu, nur plumetoj
alteriĝas
Nedubeble, la birdino
de kvar tagoj fastas
Feliĉege!

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (73) SILABENIGMO: Nur tiu, kiu nenion faras, neniam eraras.
KRUCVORT-ENIGMO: id oficial neon tre ok kuliso or koal aspekti ungo erasm lo id fae
minolta kt ret eolo masakrado ovo iodo tirano el eliro monero